

KOMENCANTO 7 ^{'98}

gazeto por komencantaj esperantistoj kaj komencantaj aŭtoroj

redakcie

Karaj legantoj!

Vi havas feliĉon teni en la manoj la sepan numeron de nia gazeto.

En ĝi ni daŭrigas temon pri E-to kaj radiofonio per prezento de Pola Radio kaj ties muzika konkurso.

La vicaj prezentataj periodaĵoj estas revuoj de la landaj asocioj de tri skandinaviaj landoj — Norvegio, Svedio kaj Finnlando.

En la gramatika parto temo pri SEKSO.

Poste sekvas tre interesa rakonto de nia abonantino el Svedio *Ann-Louise Åkerlund* pri du svedaj tradicioj.

Sur la sesa paĝo noveleto de *Florian nad Metuji* [Nederlando], jam konata por vi laŭ ŝia debuto en K-5.

Denove vi ĝuos la ĉarmajn versojn de NEKONATULO, kies debuto okazis en K-2.

La paĝo sep donacos al vi anekdotojn el vivo de studentoj kaj profesoroj. MUZIKAN KONKURSON de Pola Radio kaj krucvortenigmon de *Vladimir Jugajk* pri turismo en FREŜA AERO.


Sur la oka paĝo tradiciaj adresoj por korespondi.

Lernu

ESPERANTOⁿ

Abonu

KOMENCANTOⁿ!



La amiko de vojaĝanto.

Bill Thorne
(Londono)

1999+

KOMENCANTO

1998 numero 7
fondita en 1992
8 numeroj jare
redaktas kaj eldonas:
Viktor Kudrjavcev
konstanta kunlaboranto:
Rafija Jafasova
adreso: 620041, Ekaterinburg,
ab. ja. 132, Ruslando
elektronika poŝto (pagata):
let@post.e-burg.su
abontarifo por 1999:
internacia tarifo:
24 nederlandaj guldenoj aŭ \$12
orienteŭropa kaj
latinamerika tarifo: \$10
aŭ por ĉiuj — 15 IRK
konto ĉe UEA: **vkud-a**
ruslanda tarifo: 54 рубля
(за 8 номеров в год) простым
почтовым переводом на имя
Кудрявцева Виктора Васильевича:
620041, Екатеринбург, а. я. 132

PERANTOJ de "K"

laŭ ĉi-subaj adresoj vi povas
aboni nian gazeton

AŬSTRALIO

Libroservo de AEA, P.O.Box 230
Matraville N.S.W. 2036

ĈEĤIO

Vladislav Hasala, A.Dvoráka 1,
CZ-696 62 Strážnice

ESTONIO

Virve Ernits, Mahla 65 — 1, EE
— 0012, Tallinn

ITALIO

Višnja Brankovič, Via Leghissa
6, IT-34131 Trieste

POLLANDO

Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul.
Broniewskiego 77-137,
PL-01-865 Warszawa

SVEDIO

SEF, Lisbet Andréasson, Södra
Rörum pl 455, SE — 24294

HÖRBY**SVISLANDO**

Christoph Scheidegger, Im
Schleedorn 6, CH — 4224

NENZLINGEN**UKRAINIO**

Dmitrij Cibulevskij, ab.skr. 9307,
UA — 310003, Ĥarkiv

Historiaj studoj de K

**PAROLAS VARSOVIO**

"Ni klopodas respekti la alkutimiĝojn de niaj legantoj"

(Andrzej Pettyn, estro de la E-redakcio)

Pola Radio. Esperanto-Redakcio estas la ŝtata radiostacio. Informoj pri Pollando kaj pri la Esperanto-movado, koncertoj kun bondeziroj, leterkesto. 14 elsendoj semajne dum 7 horoj (ĉiutage 2 elsendoj dum 30 minutoj) Redaktas *Andrzej Pettyn*

lom el historio:

En 1928 la plej nevenkebla fortikaĵo ankaŭ cedis: La 15-an de decembro tra la radiostacio en Varsovio disaŭdiĝis la unuaj Esperantaj vortoj de Wiesenfeld. Ekde tiu tempo ĉiujare je la sama dato Wiesenfeld parolas tra la pola stacio en Esperanto. En 1934 la Pola Radio jam regule disaŭdigadis E-tajn prelegojn.

La nuna Esperanto-redakcio de Pola Radio kalkulas siajn jarojn ekde la datrevena tago la 4-an de aprilo 1959. Do, en la sekva 1999-a jaro la E-redakcio festos sian 40-jaran jubileon. Ni ravas pri tiu longjareco de aktivado en la kampo de nia kara lingvo kaj anticipe gratulas la kolegojn! Ni deziras al ili grandajn sukcesojn kaj disvastigon de ilia aŭskultantaro. Laŭ la multjara statistiko la Esperanto-redakcio de Pola Radio solide okupas unu el tri unuaj lokoj inter alialignvaj redakcioj de Pola Radio, interalie dank'al via aktiva subteno perletera, karaj aŭskultantoj.

La redakcia teamo de ER konsistas el Ewa Krach (Eva Kraĥ), Anna Limont (Anna Limont), Barbara Pietrzak (Barbara Pjetŝak), Andrzej Pettyn (Andŝej Pettin); konstante kunlaboras Milada Szwedo (Milada Ŝvedo) kaj Remigiusz Grzela (Remigiuŝ Gjela). Tiujn nomojn vi povas aŭdi en etero.

Kion ankoraŭ pri "Parolas Varsovio en Esperanto..."? Sed ne necesas diri, necesas aŭskulti!

Ekde la 25.10.98. en la aktualaj frekvencoj konstantas

KONSTANTAJ PROGRAMEROJ

Aktualaj frekvencoj	41,18m; 41,09m; 7285 kHz 7305 kHz	41,64; 49,22; 41,27; 49,71m; 7205; 6095; 7270; 6035 kHz
Tago	15.30 h	20.00, \ 22.30 h
Lunde	Homoj kaj problemoj	Koncerto kun bondeziroj
Marde	Koncerto kun bondeziroj	Esperanto-gazetaro
Merkrede	Esperanto-gazetaro	Familiaj temoj
Jaude	Familiaj temoj	Kultur-temoj
Vendrede	Kultur-temoj	Homoj kaj problemoj
Sabate	Esperanto-ekspreso	Leterkesto
Dimanĉe	Leterkesto	Esperanto-ekspreso

Ni petas ĉiujn legantojn de KOMENCANTO skribi al

Pola Radio Esperanto-Redakcio, 00-977 Varsovio, Poŝtfako-46

la hejmpaĝo en la Reto: <http://ourworld.compuserve.com/homepages/simono/polrad.htm>

Pri MUZIKA KONKURSO, organizita de PR legu sur la paĝo 7.

La redakcio danke akceptas
donacojn por prospero de
KOMENCANTO
kaj Esperanto-movado

La sekva numero de
KOMENCANTO
aperos
la 1-an de decembro 1998

La Espero

Estas oficiala organo de Sveda Esperanto-Federacio. Havas subtitolon "Svenska Esperanto-Tidningen". Aperas 6-foje jare, unu duobla numero., havas 16 paĝojn A4. Redaktas *Jan Setreus* kaj *Franko Luin*, (teknika redaktoro).

Historio: En Svedujo komenciĝis la disvastigo de Esperanto en la plej fruaj tempoj. Jam en 1895 oni eldonis "Lingvo Internacia". De januaro 1906 ĝis oktobro 1908 oficiala organo de la landa ligo estis "Esperantisten". 1909-10 sciigojn de la svedaj esp-istoj publikigis "Dana Esperantisto". En marto de 1910 svedaj esp-istoj ricevis novan organon SVEDA ESPERANTISTO. De februaro 1913 anstataŭis ĝin "La Espero", kiu aperas ĝis hodiaŭ sub la titolo "Svenska E-Tidningen. La Espero." Jam estas 86 jarkolektoj. La revuo estas dulingva — 75% en esperanto kaj 25% en la sveda lingvo.

Konstantaj rubrikoj: internaj aferoj, agado, junularo, el la kluba historio, tra la mondo, interreto, estontaj aranĝoj, kolekto 2000, filatelo, enigmoj... La artikoloj estas detalaj, kun profunda scio de la aferoj kaj multaj konkretaj ciferoj. Eldonkvanto 1500, estas nigra-blanka, bonkvalitaj fotoj, kaj kompostado.

Abonoj: 170 svedaj kronoj
Adreso: Esperanto-Centro Vikinggatan 24, 11342 STOKHOLM, SVEDIO
retpoŝto: espero@esperanto.se

NORVEGA ESPERANTISTO

Estas oficiala organo de Norvega Esperantista Ligo. Havas subtitolon "Esperantobladet". Dumonata, aperas 6-foje jare, havas 24 paĝojn A5. Redaktas *Douglas Drapaa*.

Historio: La unua gazeto portis nomon "Norvega Esperanto-Gazeto" (januaro-decembro 1909). En januaro 1910 - junio 1914 "Norvega Esperantisto"; ekde 1911 fariĝis oficiala organo de NEL ekde ĝia fondo en 1911. La dua periodo estis 1922-24. La tria komenciĝis en 1932 kaj ekde tiam ĝi aperas pli-malpli regule sub la nomo "Esperanto-Bladet" ĝis hodiaŭ. La revuo estas dulingva — norvega kaj esperanta.

Konstantaj rubrikoj: la prezidanto, norvega kroniko, INTER NI DIRITE, farata de diversaj estraranoj de NEL, instruado, administrado kaj multaj aliaj. La revuo estas sufiĉe vigla. Ĝi respiegulas ĉiujn aktualajn eventojn ene de la lando, ekzemple: "Ĉu funkciaj kluboj ekzistas?" "Ni diru nur la veron!" Raportoj pri laboro de NEL kaj ĝiaj financaj kaj agadaj raportoj. Oftas rakontoj pri esperantistaj eventoj eksterlande kaj pri esperantistaj amaskomunikiloj. Eldonkvanto 630, estas nigra-blanka, sufiĉe simple presita.

Abonoj: egalvalore 80 norvegaj kronoj.
Adreso: Olaf Schous vei 18, N-0572 OSLO, NORVEGIO
Retpoŝto: esperanto@online.no

ESPERANTOLEHTI

Estas oficiala organo de Esperanto-Asocio de Finnlando. Havas subtitolojn "Esperanta Finnlando" kaj "Esperantobladet".

Dumonata, aperas 6-foje jare, havas 24 paĝojn A5. Redaktas *Aimo Rantanene*.

Historio: La 3-an de februaro 1906 estis fondita en Helsinko ĝenerala societo esperanta la "Polusstelo". Dum ties unua agadjaro en aprilo 1907 ekaperis la "Finna Esperantisto", la unua antaŭanto de la "Esperantolehti". La "Finna Esperantisto" aperis ekde la jaro 1907 ĝis junio 1910 kaj ekde la jaro 1912 ĝis julio 1914.

Post la Rusia revolucio kaj sendependiĝo de Finnlando en 1917 — 1918 reaperis gazeto sub la titolo "Esperanta Finnlando". La gazeto aperis en 1918 - 1919 kiel kromfolio de "Kodin lehti", duonmonata porfamilia gazeto. La eldonisto estis la Esperanto-Asocio de Finnlando 1918-1919, eldona akcia societo Otava en 1920-1922 kaj la Esperanto-Instituto de Finnlando en 1923.

La jaroj 1920-1922 esperanto-movado en Finnlando kreskis rapide, la gazeto havis abonantojn kaj ricevis anoncojn. Ĝi publikigis multflankan kaj interesan materialon kaj estis por tiutempa eldonaĵo riĉe ilustrita. Poste pro perdo de abonantoj kaj anoncoj la "Esperanta Finnlando" devis ĉesi meze de la jaro 1923. En la fino de la 1940-aj jaroj, kiam la esperanto-movado komencis refortiĝi post la Dua mondmilito, oni faris provojn revivigi la "Esperantan Finnlandon". La eldonisto estis la Esperanta Instituto de Finnlando. Ĝi aperis en 1948 - 1949 kaj 1951-53, sed ne sukcesis ekonomie.

Sian plej longan kaj sufiĉe bonan periodon de aperado havis la "Esperanta Finnlando" en 1959 — 1987. La reunuiĝo de la finnlanda Esperanto-movado en 1965 kaj la 54 Universala kongreso en Helsinko 1969 estis la plej rimarkindaj okazintaĵoj de tiu periodo.

"Esperantolehti" estas praktike dulingva: esperanta kaj finna. Ĝi aperigis provnumeron en 1989 kaj aperas regule ekde 1990. La redaktoro estis Jukka Pietilinen 1989 — 96 kaj estas *Aimo Rantanene* ekde 1997.

Konstantaj rubrikoj: de la prezidanto, recenze, por komencantoj, agado, novaĵoj, venontaj, asocioj, gazetaro kaj aliaj. Eldonkvanto 600 ekzempleroj. Estas nigra-blanka, sufiĉe altkvalite presita.

Abonoj - egalvalore 80 finnaj markoj. Por membroj 60 FIM.
Adreso: Siltasaarekatu 15 C 65, FIN-00530, HELSINKI, FINNLANDO
Retpoŝto: ilkka.santtila@icf.fi

Hodiaŭ ni prezentas tri revuojn, kiuj estas oficialaj organoj de siaj landaj asocioj. Ili estas tre proksimaj geografie kaj aperis ĉe la unuaj jaroj de aktiva esperantista movado. Pro tio ili havas multajn komunajn kaj similajn trajtojn kaj taskojn.

Bonvenon en SKANDINAVION!



LINGVAJ
RESPONDOJ

GRAMATIKO

kajj SEKSO

Pri la prefikso "GE"

La prefikso *ge* rilatas ne sole al *du* personoj, sed ĝi povas rilati ankaŭ al *múltaj* personoj; ĝi signifas simple "de ambaŭ seksoj". Mi persone ĝis nun uzadis tiun ĉi prefikson ĉiam nur por esprimi ian *ambaŭseksan familian tutajon el personoj starantaj en la sama linio de parenteco*, tial mi diradis ekzemple "gepatroj", "gemastroj", "gefratoj", "genepoj", "gekuzoj", "getajloroj" (en la senco de "tajloro kaj lia edzino"); sed ni neniam esprimis ekzemple per "getajloroj" la tutan familion de tajloro, ĉar la gefiloj de tajloro ne staras en la sama linio de parenteco kun la tajloro, kaj mi ankaŭ evitadis diri "gesinjoroj" pri personoj, kiuj ne apartenas al unu familio (mi nomas ilin "sinjoroj kaj sinjorinoj"). Tamen mi konfesas, ke mi havis nenian kaŭzon, por uzadi la prefikson *ge* sole en la dirita maniero. Ĉar en la fundamenta (universala) vortaro de nia lingvo *ge* signifas simple "de ambaŭ seksoj", kaj ĉar la uzado de la prefikso en tiu ĉi senco neniam donas malkompreniĝon, tial ni povas tre bone uzi tiun ĉi prefikson en *ĉiuj* okazoj, kiam ni parolas pri ambaŭ seksoj. Sekve se al personaro, kiu konsistas el ambaŭ seksoj, iu sin turnas kun la vorto "gesinjoroj", li faras nenian eraron, kaj eble mi mem ankaŭ de nun iafaje uzados la prefikson en tiu ĉi senco".

Respondo 6, *La Revuo*, 1907, Februaro

Pri la uzado de "LI" anstataŭ "ĜI"

Vi skribas, ke parolante pri infano vi skribas "li" anstataŭ "ĝi", ĉar vi ne aprobas "la anglan kutimon starigi infanojn sur unu ŝtupon kun bestoj kaj objektoj". Kontraŭ la uzado de "li" en tiaj okazoj oni nenion povas havi; sed la *kaŭzo*, kial ni (kaj ankaŭ la lingvo angla) uzas en tiaj okazoj "ĝi", estas ne tia, kiel vi pensas. Nek la lingvo angla, nek Esperanto havis ian intencon malaltigi la indon de infanoj (ambaŭ lingvoj estas ja tial ĝentilaj, ke ili diras "vi" ne sole al infanoj, sed eĉ al bestoj kaj objektoj). La kaŭzo estas tute natura sekvo de la konstruo de la ambaŭ dirtaj lingvoj. En ĉiu lingvo ĉiu vorto havas (tute ne logike) difinitan sekson, kaj tial, uzante por ĝi pronomon, ni prenas tiun, kiu respondas al la gramatika sekso de la vorto (tial la franco diras pri infano "il", la germano diras "es"); sed en la lingvoj angla kaj Esperanto la vortoj havas nur sekson *naturan*, kaj tial, parolante pri infanoj, bestoj kaj objektoj, kies naturan sekson ni ne scias, ni *vole-ne-vole* (sen ia ofenda intenco) uzas pronomon mezan inter "li" kaj "ŝi" — la vorton "ĝi". Tiel same ni parolas ankaŭ pri "persono". Cetere, parolante pri infano, pri kiu ni scias, ke ĝi *ne* estas knabino (aŭ almenaŭ *ne* scias, ke ĝi estas *knabino*), ni povas uzi la vorton "li".

ESPERANTISTO, 1893, p.16

Pri "LI", "ŜI", "ĜI"

La pronomoj "li" kaj "ŝi" estas uzataj nur por personoj; por aferoj, objektoj kaj ankaŭ por bestoj ni uzas la pronomon "ĝi", ĉar

en tiaj okazoj la sekso ne ekzistas. Se ni tamen, parolante pri objektoj aŭ bestoj, volas esprimi difinitan sekson (viran aŭ virinan), tiam ni povas uzi "li" kaj "ŝi".

ESPERANTISTO, 1892, p.79

Pri "ĜI" anstataŭ "TIO"

La vorton "ĝi" ni uzas, kiam ni parolas nek pri viro, nek pri virino, sed pri io, kio ne havas sekson aŭ kies sekso estas por ni nekonata aŭ indiferenta; sekve ni preskaŭ ĉiam povas tute bone uzi tiun ĉi vorton ankaŭ anstataŭ "tio", kies senco estas preskaŭ tia sama. Tial anstataŭ "tio (= la "io" kiun mi nun vidas antaŭ mi) estas vi, Ivan Karpoviĉ", mi povas tute bone diri "ĝi estas vi, Ivan Karpoviĉ".

Respondo 17, *La Revuo*, 1907, Junio

Pri pronomo por "HOMO"

Kiam ni parolas pri homo, ne montrante la sekson, tiam estus regule uzi la pronomon "ĝi" (kiel ni faras ekzemple kun la vorto "infano"), kaj se vi tiel agos, vi estos gramatike tute prava. Sed ĉar la vorto "ĝi" (uzata speciale por "bestoj" aŭ "senvivajoj") enhavas en si ion malaltigan (kaj ankaŭ kontraŭkutiman) kaj por la ideo de "homo" ĝi estus iom malagrabla, tial mi konsilus al vi fari tiel, kiel oni faras en la aliaj lingvoj, kaj uzi por "homo" la pronomon "li". Nomi tion ĉi kontraŭgramatika ni ne povas; ĉar, se ni ĉiam farus diferencon inter "homo" kaj "homino", tiam ni devus por la unua uzi "li" kaj por la dua "ŝi"; sed ĉar ni silente interkonsentis, ke ĉiun fojon, kiam ni parolas ne speciale pri sekso *virina*, ni povas uzi la viran formon por *ambaŭ* seksoj (ekzemple, "homo" = homo aŭ homino, "riĉulo" = riĉulo aŭ riĉulino k.t.p.), per tio mem ni ankaŭ interkonsentis, ke la pronomon "li" ni povas uzi por homo en ĉiu okazo, kiam lia sekso estas por ni indiferenta. Se ni volus esti pedante gramatikaj, tiam ni devus uzi la vorton "ĝi" ne sole por homo sed ankaŭ por ĉiu alia analogia vorto; ekzemple, ni devus diri: "riĉulo pensas, ke ĉio devas servi al *ĝi*" (ĉar ni parolas ne sole pri riĉaj viroj, sed ankaŭ pri riĉaj virinoj).

Respondo 23, *La Revuo*, 1907, Aŭgusto

-in

sufikso, montranta estajon apartenantan al la sekso organizita por gravediĝi kaj naski kaj almetebli al:

1. bestonomoj: *bovino, kokino, katino*
2. homaj parenconomoj: *patrino, filino, fratino*
3. nomoj, esprimantaj kvaliton, funkcion ks: *amatino, belulino, virino, karulino, princino.*

Ann-Louise Åkerlund, [Ätekullagatan 16, SE - 25361, Helsingborg, Svedio]

Multaj eksterlandanoj opinias, ke svedoj estas trankvilaj kaj seriozaj. Tamen, vizitante Svedion meze de aŭgusto ili devas ŝanĝi sian opinion. Tiam okazas la *kankro-festenoj*, popularaj precipe en la sudaj kaj mezaj partoj de la lando, kaj la manĝado de fermentitaj baltaj haringetoj, kio estas norda kutimo.

FESTENO ĈE LA BRILO DE LA LUNO

**Svedaj
tradicioj**




Manĝado de fermentitaj baltharingetoj estas norda kutimo, ĉar nur apud la nordaj bordoj de la lando oni trovas la malgrandajn baltharingojn. La fermentado estas malnova metodo por konservi fiŝojn.. La salo estis multekosta, kaj anstataŭ meti en salon la fiŝon, oni prenis nur tiom da salo necesa por la fiŝo ne putru, sed fermentu. Nuntempe la haringetoj fermentas en konserv-skatoloj, kaj meze de aŭgusto ili pretas. Tiam, kiam estas tempo gustumi la haringetojn de la jaro, stranga odoro disvastiĝas en la ĉirkaŭaĵo.

Oni manĝas la haringetojn kun la tipa nord-sveda speco de terpomoj, kiu estas flava kaj migdalforma kaj tre bongusta. Aldone oni manĝas hakitan flavan cepon kaj specialan maldikan panon, faritan de *hordea* faruno. La trink-kutimoj similas al tiuj de la kankro-festenoj. Pro la tre aparta odoro *norrlandanoj* (homoj en la norda parto de Svedio) tre ĝojas inviti sensuspektajn eksterlandanojn gustumi la "nacian pladon" de Norrlando.

Kvankam manĝado de *kankroj* (*astako*) estas unu el la plej "svedaj" kutimoj, ĝi ne estas tiom malnova. Nur post la dua mondmilito la kankrofesteno iĝis kutimo de la tuta popolo kaj ne nur de la aristokratio kaj la burĝaro bonhava. Nuntempe en neniu alia nacio oni manĝas pli da kankroj ol en Svedio, preskaŭ 0,4 kilogramo popersone ĉiu jaro.

Oni manĝas laŭ definitiva *ritaro*. Se la vetero estas bona oni aranĝas la tablon sub la libera ĉielo. La loko estas ornamita per *lampiono*j, floroj kaj eble festonoj, kaj la partoprenantoj ofte portas gajajn paperajn ĉapeletojn. Ili ankaŭ portas brust-tukojn, ĉar kankromanĝado estas iom malpuriga afero. Oni deŝiras la kankron, rompas la ungegojn kaj elsuĉas la enhavon. La *ŝmacoj* kaj la *sorbadoj* estas plurfoje interrompataj de komuna kantado. La kutimo postulas ke antaŭ preni glaseton da brando oni kantu strofon pri la bonfaro de tiu *fluidaĵo*. Ekzistas granda nombro de trink-kantoj en Svedio. Ofte oni verkas novajn vortojn por la okazo.



kankro — dekpieda, ĝis 10 cm longa krustulo, vivanta en nesala akvo, konebla per longa pinto inter la okuloj, tre bongusta; = *astako* (*Potamobius astacus*); *fermentitaj* — ĉi-tie: iom putritaj; *haringo* — mara fiŝo, vaste konata; *ritaro* — vico da ceremonioj; *lampiono* — diverskolora vitra aŭ papera ujo, uzata en iluminado; *festono* — ornama girlando; *ŝmaci* — fari bruon de suĉado; *sorbi* — enspirante entiri likvaĵon... *fluidaĵo* — likva aŭ gasa substaco; *hordeo* — grajnoj, kiuj estas uzataj por fabriki bieron kaj furaĝon



Florian nad Metuji

[Den Haag, Nederlando]

Mi trikas longajn, plurkolorajn ,
dikajn ŝalojn el artlano, mi donis unu
al junulo kiu sidis en la Anemono-
strato sur la trotuaro, li ludis gitaron
kaj kantis, lia kaskedo kuŝis renversa
antaŭ li, preterpasantoj metis en ĝin
monerojn. Mi demandis al la junulo,
ĉu li volas akcepti de mi trikitan ŝalon,
li diris "jes" kaj tuj volvis ĝin ĉirkaŭ la
kolo, li ne estis varme vestita.

"Ĝuste tio, kion mi bezonis", li diris
ĝoje. Li ekstaris kaj ĉirkaŭbrakis min,
mi frapis lin ŝur la ŝultron. Li havis
honestajn, blujajn okulojn. Li diris al
mi, ke la patrino havas
naskiĝodatrevenon, mi bondeziris al
li. Li diris, ke li kredas je Dio, mi diris,
ke mi ankaŭ.

NIRONATULO

[Nabjerĵenije Ĉelni, Ruslando]

*al mia amikino, esperantistino el
u.Bilbao, dediĉas ...*

Bela songo vizitis min nokte,
Mi renkontis bilbaoaninon,
Ŝi ridetis kaj ĉirkaŭĉarmis,
Eĉ elspiris mi: "Ho, VIRINO!"

Mi karese demandis VIRINON:
"Kiu nomon Vi havas eta?",
Ŝi bruliĝis per brunaj okuloj,
Kaj kurtvorte respondis:— Keta!,

Gaje falis suneroj sur teron,
Ploris rozo en libroŝranko,
Brakumadis mi viajn genuojn,
Kaj parolis al Sorto: — Dankon!,

Sed alvenis kruela mateno,
Kaj forigis dolĉlipan nokton,
Mia songo forflugis ĉielon,
Kaj ne diris eĉ unu vorton,

Mi per manoj varmigas rozon,
Mi ĝemante kisas suneron,
Ĝis revido, ho, bilbaoanino,
Rimarkinda Keta Sesmero.

N



Hajdarova Violetta
[SIBAJ, Baŝkirio, RUSIO]

— Sinjoro, vekigu,
vekiĝu !
— Kio okazis?
— Venis tempo por
trinki dormigilon!!

el vivo de studentoj kaj profesoroj

Studento:

— Mi en sonĝoj vidas min profesoro! Kion fari por la sonĝo efektiviĝu?

— Necesas pli malmulte dormi!

...

Oni demandas dekanon:

— Kiom da studentoj studas en via fakultato?

— Proksimume du trionoj

...

Profesoro:

— Ekzameno estas kvazaŭ teatro: vi estas aktoro, mi spektanto.

Studento:

— Bonege! Ĉu mi povas voki sufloron?

...

Profesoro:

— Kiujn tri vortojn pli ofte uzas studentoj?

— Mi ne scias.

— Vi pravas!

...

Patro demandis sian filon:

— Kial vi ne sukcesis en la ekzameno! Vi ja sciis ĉiujn demandojn!

— Jes. Sed mi ne sciis la respondojn.

...



MUZIKA KONKURSO

E-Redakcio de Pola Radio afable petas ĉiujn E-amas-komunikilojn kontribui al la realigo de la konkurso kaj per tio — al la evoluigo de la muzika kulturo en E-to.



La celo de la konkurso estas atentigi la esperantistaron pri la ligoj de E-to kun muziko, popularigi la ĝisnunan utiligadon de la internacia lingvo por muzikaj celoj (kantoj, leĝeraj kanzonoj, serioza muziko, ktp), sed ankaŭ vastigi la aplikadon de muzikaĵoj en la formo de kantoj por didaktikaj celoj kaj utiligadon de E-to kiel inspiformo por komponistoj.

Por partopreni la konkurson sufiĉas respondi al unu el la tri demandoj:

1) Kiu el la originalaj poemoj de la kreinto de Esperanto, Ludoviko Zamenhof, fariĝis kanto-teksto?

2) Menciuj almenaŭ unu el la konataj al vi kantistoj (kanto-grupoj, orkestroj), kiuj plenumis aŭ plenumas kantojn en E-to?

3) Kiu konata al vi komponisto havas ĉi-jare rondciferan datrevenon de la naskiĝo (morto)? Kiun — ekzemplodone — komponaĵon de tiu komponisto vi konas?

La respondojn oni sendu al la adreso:

Pola Radio, Esperanto-Redakcio, 00-977 Varsovio,
Poŝtfako 46, Pollando

KONKURSO

KRUCVORTENIGMO de Vladimir JUGAJK [OSTAŝKOV, RUSIO]


FREŜA AERO

horizontale

1 supra jaketo de turisto 2 seka peco de pano 3 gaso, kiun ni spiras 4 ĉiela korpo-formo: stelo, kometo, 5 per kio oni remas 6 instrumento, per kiu oni trovas magnetan nordon 7 malgranda lanterno 8 turista aŭ soldata kaldrono 9 matena krepusko, kiam ĉielo ruĝiĝas

vertikale

1. vazeto por trinki 2. malgranda rivereto 3. sur kio oni paŝas aŭ veturas 4. NaCl 5. malgranda akvoveturilo 6. intervalo de tempo 7. pikanta insekto 8. tenda urbeto 9. planto, kreskaĵo 10. akvomaso, kiu leviĝas kaj refalas ĉe la supraĵo de maro, lago ks sub la blovo de vento 11. tutaĵo de la irotaj vojoj inter la deirpunkto kaj la celo de vojaĝo 12. malgranda saltanta besteto el la klaso de amfibioj



RESPONDOJ al la konkursajoj de **KOMENCARIO 5**. LIBROBRETO la ĉifrita frazo estas: "La libro simila al la akvo, vojon tratabas ĉie"

KRUCENIGMO de Stanislav Kacko, horizontale: 1 aforismo, 2 monto, 3 kavo, 4 lundo, 5 betono, 6 muziko, 7 suno, 8 turkiso, 9 buketo, 10 kotono, 11 oktobro, 12 turismo; vertikale: 1 artisto, 2 arĝento, 3 kampo, 4 bovo, 5 ĉerizarbo, 6 apoteko, 7 konuso, 8 fenkolo, 9 oksido, 10 luno

KORESPONDU!

Ĉiu kadro kostas 3.000 rublojn aŭ 2 Internaciajn Respondkuponojn
Por pagintaj abonantoj de "x" - senpage

Sergeo Ĥijnjak
42 ja., emerito, pri
ĉiuj temoj

Gorlovskaja, 11
ĤARKIV
310172
UKRAINIO

Natali Kofina
22ja., muziko, libroj

Perevoznaja 118,
korp 2, kv. 4
ASTRAHAN
414052
RUSLANDO

s-ro Tony Solmon
Ledrein

25ja., korespondi
9, rue des Linsons
FR.35430
St.JOUAN
FRANCIO

Izabella Dfeksion
15ja., ĉio pri Usono
kaj Kanado

Aluminievaja, 70-34
KAMENSK-URALSKIJ
Sverdlovskaja obl
623408
RUSLANDO

f-ino Iva Stodolova
14 ja., korespondi

Vetma 15,
CZ.568-02
SVITAVY
ĈEĤIO

1999

KOMENCANTO

vi abonis?

Sergeo Kostromin
18ja., pentrado,
verkado de rakontoj

Parkovaja, 9-53
KRASNOURALSK
Sverdlovskaja obl.,
624330
RUSLANDO

s-ino Larisa Grigorjevna
Mujanovskaja
53 ja., korusa kantado,
vojaĝoj

Novaja, 6 — 1
OĤOTSK, 682480,
Ĥabarovskij kraj
RUSLANDO

s-ro Diakite Drissa
Flayoro

verŝajne la sola esp-isto en
Mali! Tutmonde pri ĉiuj
temoj

P.G.R.N. BP.16,
DIEMA - KAYES
MALIO

s-ino Ludmila Grigorjevna
Krasnojorova
57ja., floroj, konstruado,
trikarto, angla lingvo k.t.p

ab.ja. 3005
IJEVSK
Udmurtio 426008
RUSLANDO

Luis Angel Ravelo
Hoes

12 ja., diversaj temoj
Calle Hiraldo Toledo, n^o
16, C2, Santo Domingo
El Marti Independencia,
53000 VILLA CLARA
KUBO

Gabriel Lopez
14 ja., korespondi

Ave 56,
4924,
E.49/51, 55100,
CIENFUEGOS
KUBO

Maksim Petrov

19ja. astronomio, pentroarto;
kun junulinoj ekster KŜŜ

Kamzina, 31-63
AKSU, 638310,
Pavlodarskaja obl.,
KAZAĤIO

s-ro Alvacu Plaudo da
Silva

korespondi kun knabinoj
tutmonde pri ĉiuj aferoj

p.k. 2685
BR.80.001-970
CURITIBA Pa.
BRAZILO

Viktor Alikin

pri ĉiuj temoj
korespondi

Jeljkina, 47 — 5
PERMO
614016
RUSLANDO

KORESPONDI... listo de dezirantoj korespondi
enhavas pli ol 45 adresojn Sendu vian anoncon por
senpage enpresigo; aldonu 2 Internaciajn
Respondkuponojn, se vi deziras ekzempleron. Lastan
eldonaĵon vi ricevos sendante unu IRK aŭ 10 adresojn de
seriozaj esperantistaj korespondemuloj el diversaj landoj.
R.MELO, 34, Avenue de Russie, FR.03700
BELLERIVE S/Allier, FRANCIO

Abonu **KOMENCANTO** -n!

Por 1999 vi ricevos same 8 numerojn jare, 80 paĝojn A4 por la tuta periodo
Internacia tarifo: 24 guldenoj aŭ \$12; por orienta Eŭropo kaj Latina Ameriko \$10
aŭ por ĉiuj 15 IRK: **ruslanda tarifo** 54 rubloj

